

& Novaj kondiĉoj:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 320 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis Mikaelo Bronŝtein. Klarigoj (*): '1 SEJM = Sovetia Esperantista Junulara Movado. '3 Aktuale, revuo de SEJM.>

(#Melodio:

(/dodo dodo mi do; dodo TiLa Fa a; TiTi TiTi reTi Ti; SoSo LaTi do o;; dodo dodo mi do; dodo TiTa La a; fafa mire mi do; SoSo LaTi do o;

(#Rekantaĵe: (do o mido do doTi La La So; Ti i re Ti SoLa Ti re do)×2)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Vivis ni trankvile ; En kutima SEJM*. ; Estis ĝi por ĉiuj ni ; Kvazaŭ kara hejm'. ;; Sed aperis kaŭzo ; Por ĉiesa mir' – ; Pri kondiĉoj novaj ; Venis onidir'.

(×: 2× **Aĥ, kiaj ni estas feliĉaj, ; Ke venis novaj kondiĉoj...**)

'2 Estis konferencoj – ; Vere bona far'! ; Interŝanĝis sperton ni ; Ankaŭ en tendar'. ;; Oni rekomendas, ; Eble estas ver'... ; Interŝanĝi sperton ; Hejme per leter'.

'3 Ni en "Aktuale"* – ; Bona informil'! – ; Legas artikolojn Ĉiam kun util'. ;; Oni rekomendas – ;

Eble estas ver'... ; Ĝui la informojn ; Hejme per leter'.

'4 Estis niaj kantoj ; La mistera mond'. ; Ĉe la fajro kantis ni ; En amika rond'. ;; Oni rekomendas, ; Eble estas ver'... ; La komunajn kantojn ; Kanti per leter'.

'5 Eble mi ne pravas – ; Fia tumultul' – ; La kondiĉoj novaj ; (Dume) estas en nebul'. ;; Ĝoju kaj petolu, ; Nia kompani' – ; En kondiĉoj novaj ; (Eble) bone vivos ni.

(×: **Aĥ, kiaj ni estas feliĉaj, ; Ke venis novaj kondiĉoj... ; Aĥ, kiaj ni estus feliĉaj, ; Se restus SEJMaj kondiĉoj...**))